

19/4 1913

## SOLIDARECO.

*Verkis dr Stan Kamaryt.*

Fino de antiko komencis en parolo de Pilato „Kio estas vero!?“ La komenco de la unna jarmilo estis sub signo de alta kulturo ne nesimila el la kulturo hodiaŭa Al ĉin estis donita poveblo valorigi sian individualecon. La avo de imperiestra amiko Horatius estis sklavo, same kiel estis sklavoj patroj de Cicero kaj Diokletianus. La kulturo starigis sur la plej altan ŝtupon kaj rafinecon; el ordinaraj agoj karpaj fariĝis ĝuoj. Manĝo, trinko, virino, suno, aero, akvo estis serĉataj konscie, kaj estis uzataj tiel, ke la agrabla sento akompananta ilian uzon estu grandigita ĝis la plej atingebla volupto, same kiel nun. Sed ĉe tio malaperadis kontenteco de individuoj same kiel nun. Ĉiu sciis ŝanĝi valoron de valoraĵoj, sciis ŝanĝi vidmanierojn kaj pruvi pri la sama afero, ke ĝi estas bona aŭ malbona, tiel bone, kiel ni nun hodiaŭ tion scias. Ĉiujn komencis kapti malespero; memmartigo fariĝis ara aperaĵo, simptomo de la socio, kiel nun. En tiun malesperon venis kristanismo, — meza epoko. Songo de Kristo pri reĝeco de Dio sur la tero donis al la homaro unuecan opinion pri la mondo. Ĉiuj agoj de la vivo kaj aperaĵoj de la naturo estis rigardataj „sub specie aeternitatis“, Tio estas sen dubo profito, kiun la mezepoko alportis al la homaro montrinte poveblecon de unueca intuo de la mondo kaj spirito, ke ĝi eĉ donis al ĝi tian intuon. Ĝia idearo estis simpla, sed daŭris tre longe. Dek kvin centojn da jaroj! Poste venis denove tempo de la skeptikeco, kiu plej multe supreniĝis en dua duono de la dekaŭa jarcento.

Estis neniigitaj ĉiuj valoroj, estis skribitaj teruraj verkoj „Sonata de Kreutzer“ kaj „Pri celo de la vivo“ kaj la statistikistoj trovis, ke procentoj de memmortigoj pligrandiĝas. Plej multe trafis skeptikeco sistemon de etiko. Kristana moralinstruo forpelis for si ĉiuj avidajn ĝuantojn de la vivo pro sia asketismo, kaj moralinstruo de renesanco revivigita moralo antikva, forpelis for si pro sia fetiŝismo de ŝtato. Stirner detruegis klasikajn idealojn kolektivismajn, kaj havis je evolno de etikaj ideoj multe pli grandan influon ol Marx. Nek deziro de la postmorta vivo, nek deziro de la regulita ordo socia povis esti bazoj

de la etiko. Ĉiuj apogiloj de moraleco falis kaj peno de etikistoj haltigi aŭ apogi ilin per novaj argumentoj estas vanta. „La stelplena ĉielo super mi, kaj la morala leĝo en mi,“ kiujn ankoraŭ Kant metis kiel kaŭzo de moraleco, ne valoras plu, tiu ĉi la plej lasta apogilo de etiko falas disrompita per fera piedo de la evoluo. Fabrikaj laboristoj estas moralaj nihilistoj same kiel ĉejministroj. Moraleco fariĝis malbezona por homa koro, dekksesjaraj knabinoj volas „elvivegi“, moralistoj kaj klasoj de beati posidentes konstastas kun terurego, ke sento de devo tute malaperis, virinoj ĉesas deziri patrinecon, kaj patrinoj timas naskiĝon de infanoj hazarde naskigitajn, viroj ne volas fondi familiojn. Kaj se malaperis sento de devo, malaperis ankaŭ tute moralo.

Kaj tamen! Kaj tamen! Kontraŭ tiu ruiniĝo de ĉiuj fundamentoj de ĝisnunaj sociaj ordoj homaro iras antaŭen. Civilizacio materia kaj spirita kulturo plimultiĝas. Korpo kaj animo estas edukataj tiel, ke homo fariĝas pli kapalta uzadi fruktojn de la vivo pli multe ol antaŭe. Ptej multe karakterizas la altegan staton kulturitan de nia epoko ĝia malkontento kun ĝiaj propraj kulturaj elmontraj. Arkitekturo kaj dramo estas la plej altaj elmontraj, en kiuj montriĝas samtempa kulturo plej intensive, kaj lasas videblan postsignon al pli junaj generacioj. Sed nia epoko estas nekontento kun sia arkitekturo kaj dramo. Ibsen apartenas jam al literatura historio. Doloroj de liaj tragedioj estas fremdaj al ni, liaj modernaj mitoj ne tuŝas nian koron. Do, se la tempo estas tiel malmulte kontenta kun siaj plej bonaj verkoj, estas tio certe pruvo, kiel alta estas kulturo de nia epoko, se ĝi metas tiel severajn kriteriojn.

Do oni devas meti demandon, kio estas bazo de la alta kulturo de nia epoko, ĉu ĉiu nia celado havas idean bazon, kiu garantias al ni, ke ĝi ne detruigis pro manko de interna idea kontinuo de ĝiaj diversegaj elmontraj.

Ni asertas, ke la nuna epoko tiajn unuecigantajn ideojn havas. Ĝi estas konvinko, senta konsciigo, sed kiun oni ĉiam pli multe konsciigas: konvinko pri frateco de ĉiuj homoj, pri tio, ke interesoj de ĉiu ajn de ni estas nedisigeble kunligitaj kun interesoj de ĉiuj aliaj homoj, kaj ke sekve ĉiuj ni estas fratoj kaj devas senti nin fratoj ne pro Kristo, ne pro Marx, ne pro Tolstoj, sed pro ni mem. Ni sentas, ke nia bonfarto kultura kaj ekonomia estas kondiĉita per bonfarto de ĉiu alia, kaj per tio naskiĝas en ni sento de solidareco ne sole kun nia familio, ne sole kun nia nacio, sed kun la tuta homaro.

Tiu sento, sentetita de malnovego, ricevas novan argumentaron, kiu fariĝas racionalisma austataŭ instinkta. En la tuta mondo ni vidas, ke oni tiun ĉi senton de solidareco konsciigas. Walt Whitman kantas pri

ĝi en Ameriko, kaj Otakar Březina en Bohemujo. Scio de solidareco fariĝas vera, ĉar ĝi fariĝis instinkto.

Tiu nova solidareco tre esence diferencas de kristana amo de proksimulo eĉ de frateco, kiu estis devizo de la granda revolucio. Kristana amo havis kondiĉon en frateco de ĉiuj homoj kaj en ilia reciproka egaleco, kaj argumenton en senvaloreco de tiu ĉi mondo, pro kiu oni riskas batalojn kaj dolorojn. Ankaŭ frateco de la granda revolucio metis egalecon de ĉiuj homoj kaj argumento al ĝi estis plibonigo de komuna bonfarto. Sed la moderna solidareco havas kiel argumenton bonfarton de ĉiu individuo, kiel individuo. Estas do ĝia fundamento praktizo de ĉiuj aferoj: homa instinkto, en sia plej esenca elmontriĝo, egoismo. Solidareco de homoj direkte eligas la unanimecon. Mi, personan bonfarton deziranta subjekto, estas scie metita kiel la plej alta morala ordono. Antaŭ ĉio oni bezonas, ke oni estu feliĉa kaj la mia feliĉo estas fundamento de feliĉo kaj bonfarto de la socio, tial estas bezone, ke la mia bonfarto estu kiel eble plej granda kaj plej sendependa. Ekskluzive tia socio estas harmonie perfekta, en kiu estas individuoj perfektaj, ekskluzive tia nacio estas sendependa, en kiu estas sendependaj individuoj. Tial solidareco direkte eligas la unanimecon.

Per tio estas tre tuŝita enhavo de ideo patriotismo, servo al ideo. Ankoraŭ ĉiuj niaj patroj kaj ĝis nun multaj de ni, kiuj ne komprenis novan sencon de novaj okazaĵoj, pensas, ke ili helpas al nacio aŭ al aliaj altaj progresemaĵoj plej multe per tio, ke en ilia servo ruiniĝas kaj detruas sin, sian posedaĵon, sian bonfarton, sian feliĉon. Ni nun ne tro fidas al tiaj homoj, ni eĉ asertas, ke estas bezone atenti, ke ili per sia servo al ideo ne masku sian maldiligentecon por pozitiva laboro, malkapablecon, sian gloramagon. Ĉar ni sentas, ke tio, kion antaŭ ĉio bezonas la patrujo, nacio, ideo, estas ĝiaj loĝantoj, filoj, portantoj, kaj despli ĉiu el ili estas taŭga, despli bone por patrujo, nacio, ideo. Tial la plej bono servo al patrujo estas zorgi, ke mi mem estu forta, bona, perfekta, taŭga homo, kies laborefekto estas la plej granda. Ni do postulas, ke ĉiu vera amiko de patrujo antaŭ ĉio zorgu, ke li mem bone meritu sian vivon, ke li atentu ordonojn de korpa kaj anima higieno kaj ĉiujn siajn fortojn uzu por pligrandigi siajn ekonomiajn kaj moralajn kapablojn. Tio havas tiun nedubeblan oportunon, ke oni ekkonas, kio profitas al individuo, rilate farile, sed kio profitas al homaro, tre malfacile. Tial povas al patrujo neniam bone servi tiu, kiu donas al ĝi el sia posedaĵo tiom, ke per tio malgrandiĝas lia ekonomia aŭ morala bonito. Kiu volas ion donaci al patrujo, li donu al ĝi sole tion, kion li ekz. elspezas por fumaĵoj, sed li neniam prenu al si buŝkvanton,

kiun li volas manĝi. Se malfortiĝas individuo, malfortiĝas la tuta nacio. Higieno de korpo estas ordonita de amo al patrujo. Jam baldaŭ oni devos en lernejoj instrui pri higieno sub la titolo: amo al la patrujo. En tio montriĝas vera solidareco, tio estas nova enhavo de la malnova ideo.

La malsaĝuloj diros, ke moralinstruo fondita sur tiuj faktoj estas malnobla, ne sufiĉe grandanima, kaj ne sufiĉe ideala kiel decas por moralinstruo. En tio ili eraras; supereco de tiu moralinstruo estas videble precipe klare laŭ tio, ke plimulto de homoj ankoraŭ ne estas kapabla vivi laŭ postuloj de egoisma moralo. Oferti sin, tion kapablas en nia epoko ĉiu. Nenio estas pli facila ol oferti sin pro patrujo, gepatroj, filoj, fratoj, imperiestro; ĝi estas tiel facila kiel preĝi, fasti, manĝi trinki, dormi, legi, kompreni Shakespearon eĉ Burnson, ĉar ĉion tion fininstruis nin niaj gepatroj. Sed kuraĝe ŝiri por si de arbo de vivo orajn fruktojn de ĝojo, volupto, ĝuo, tiel, ke nia vivo eĉ vivo de la socio estu plivalorigita, jen severa ordono, kiun donas al ni nova etiko de solidareco. Plenumi tiun ordonon estas ĝis nun ofte super niaj fortoj, tial multaj ankoraŭ ne kredas ĝian pravecon. Nia sento estas ankoraŭ tro multe sub influo de kristana amo de proksimulo, ol ke ĝi povu miksi sin kun spirito de nova epoko. Ni sentas, ke spirito de nova epoko deziras de ni ion, kion ni sole sentas, kaj kion ni volus plenumi, sed ankoraŭ ne povas estante tro malfortaj por tio. Pro tio niaj oftaj moralaj krizoj. Sed niaj infanoj instruitaj en niaj doloroj komprenos kian devon donas al ili la nova epoko: fariĝi homo senerara. Sed ili estos ankaŭ kapablaj plenumi tian ordonon.

## BENEDEK.

Boheme verkis *J. S. Machar.*

Tradukis *Rudolf Fridrich.*

### I.

La soldata gloro estas por malpasia intelekto io nekomprenebla. Ni meditu sole: miloj kaj miloj da homoj malkatenigitaj de la naskiĝeja terbulo kaj forŝiritaj el la familia ligo, lasas sin armĉi, marŝas malproksimegen for de la hejma lando kaj atakas tie milojn da aliaj homoj, kiujn ili ne konas, pri kiuj ili apenaŭ iam aŭdis, kiuj ilin neniam malrajtis, tondras inter ilin el kanonoj, pafas el pafiloj, fine pikas per bajoneto kaj frapas per kolbo — ĉio laŭ signo de unu homo, kiun ili estis

vidintaj apenaŭ kelkafoje sur ekzercejo aŭ dum manovroj kaj kin ĵus staras ie post ilia dorso ekster la trafikovo baldaŭ sur ĉi tiu, baldaŭ sur tiu, baldaŭ sur alia monteto, rigardas tra lorno kaj ordonas peli taĉmentegon post taĉmentego da junaj sanaj viroj en batalon, kie oni mortas kaj kripligas. Precize simile kiel antaŭ jarmiloj — nur la bataliloj, kompreneble, progresis: ripetpafiloj, senfuma pulvo, kanonoj, kiuj pafportas ĝis kvar kilometrojn da vojo. Kaj hodiaŭ nia klerigita jarcento aldonis al ĉio tio pikantan ironion: en tempo de la paco oni konstruas hospitalojn kaj institutojn, kie oni flegas ĉiujn, kiujn la Naturo antaŭdestinas por perejo. Malsanuloj je korpo kaj animo estas dorlote zorgataj sole por longigi ilian malvaloran kaj sencelan vivon je unu jaro, kelkaj monatoj kaj tagoj (tion oni nomas „bonfarantaj kaj humanaj agoj“ —) sed en buĉejon de batalo oni puŝas homojn sanajn, fortajn, kiuj subtenas estontecon de la homaro. Kaj la armeestro, laŭ kies signo estis mortigitaj pli multaj homoj en kontraŭa partio, estas glorata venkinto. Fetiĉo de soldatoj, kiuj hazarde ne pereis en batalo, ornamo de la imperio, fiero de la nacio, brilanta ekzemplo por infanoj en lernejo, objekto de monumentoj kaj granda historia figuro.

Tia soldata gloro estas propre terura afero, sed, kion fari — la homa maso amis, amas kaj amos buĉistojn, kiuj pelis, pelas kaj pelos ĝin en buĉejon, kaj ju pli sangmakulita majstro, kun des pli pia respekto li estas amata. La deziro oferi vivon por io, ŝajnas, estas naturdevena en homo, kaj ju pli malgrandan valoron la vivo mem havas, des pli volas ĝin doni la posedanto — por akiri al ĝi valoron per ideo aŭ afero, por kiu li ĝin oferas. La roma gladiatoro estis mortanta por rideto de la rigardanta imperiestro, la unuaj kristanoj brulis pro deziro elverŝi sangon por Kristo, la krucmilitistoj mortadis sur palestina sablo por Jeruzalemo, la mizere vestitaj soldataroj de la revolucia Francujo por libereco, egaleco kaj frateco, kaj nia bohema popola ario trafe karakterizas deziron de la bohema kompatinda simplulo: „my se dáme všichni zabít za jenerála“ (ni lasos nin ĉiuj mortigi por la generalo) . . . . Jes, se oni serĉas valoron de la vivo ekster la vivo, oni venas ofte eĉ al tragika komikeco. Kaj alie ne estos: cent milionoj da homoj vivas sur la mondo kaj cent milionoj ne scias, en kio estas valoro de la vivo, serĉante ĝin ie ekstere — cetere, alie ja eĉ ne ekzistus historio de la homaro . . . .

Kompreneble, ke simila armeestro ankaŭ devis esti por soldato fenomeno rigardsorĉanta. La soldato povis kredi je dio, sed adori li devis sian komandanton. En la komandanto devis esti io supernatura, giganta. Io kiel enkorpiĝinta neevitebla fatalo. Li devis esti ĉiam preta,

ĉiam scii kiel agi, neniam montri timon, konstante egalanima kaj precipe : li ne devis indulgi mason da soldatoj. Pri individuo zorgi kiel patro, jes, sed la mason li devis trakti senkompate kiel buĉisto. Tiel vorto de la maljuna prusa Fritz repelanta la soldatojn en batalon : „Bestaĉoj, ĉu vi volas vivi eterne?“ pli sukcesis ol plej brilanta parolado. Kaj samtempe, kiel mi jam diris, la individuo postulis zorgemon; afablan vorton, frapetadon sur ŝultrojn, kompaton en klopodoj, demandadon pri aferoj privataj, pri nutrado kaj servo de la soldateto — la diaĵo devis malleviĝi al senvalora vivo, por ke tiu vivo iel kresku, fariĝu grava kaj akiru valoron . . . Ĉiuj grandaj militistoj estis simila diaĵo de siaj soldatoj : la puna Hannibal, kiu per sia soldata genio sciis regi plej diferencajn popolaĉojn de la okcidenta Eŭropo aŭ Afriko kaj konduki ilin en batalojn malproksime de la hejma lando, kio signifis en antikveco la plej grandan oferon; Julius Caesar, dio de la romaj legioj, kiuj iris post li tiel entuziasme kontraŭ barbarojn kiel kontraŭ samnacionojn, ĉar senco de ilia vivo estis la persono de Caesar; simila diaĵo estis la italaj kondotieroj en mezepoko kaj la habsburga kondotiero en la tridekjara milito Wallenstein, la granda Condé de Ludoviko XIV., la mortiganto de Turkoj princo Eugén, la prusa Fritz kaj la aŭstria Laŭdon, la rusa Suvorov kaj fine la plej granda el ĉiuj, direkte tipa soldata genio, Napoleon, dio de militoj, fatalo de Eŭropo. Frosta tremado ludas en nervoj, se oni okupigas hodiaŭ, post cent jaroj, pri tiu rigardsorĉanta aperaĵo : kiel devis bati la koro en sennomaj miloj, kiuj marŝis preter li sidanta sur sia blanka ĉevalo, en fajron por morti kaj akklamis lin entuziasme : Vive l' empereur !? Kaj li, senmova kiel Fatalo, kun nekovrita kapo sidis tie kaj rigardis per sia malvarma, ŝtala rigardo la masojn, kiuj estis donontaj vivon por liaj ideoj, planoj, pasioj, espero — monstra afero, ĉi tiu soldata gloro.

Se tamen oni skribos ĝian historion, ĝuste kun Napoleon finiĝos unu periodo : Li estis la plej granda, sed ankaŭ la lasta rigardsorĉanta aperaĵo de direktanto de bataloj. Kvazaŭ lia estaĵo disiĝus en apartajn elementojn kaj liaj sekvantoj vivus sole per unu el tiuj elementoj sufiĉanta al ili por la tuta vivo kaj ilia tasko. Alie dirite : Napoleon, kiel ĉiuj grandaj armeestroj, estis la lasta granda improvizanto de bataloj, post li la militado fariĝis ekzakta scienco. La epoko de fascinantaj poetoj de mortigado pasis, oni komencis mortigi aliamaniere. Radetzky elirinta ĵus el napoleonaj militoj estis ankoraŭ glora postesono de la pasinta epoko, la prusa Moltke estas tipo de la armeestro novepoka. Soldato-scienculo, preskaŭ matematikisto. Longe antaŭ proklamo de la milito li estas prilaborinta la planon de la tuta

nombro da vagonoj sur fervojoj, kiuj direktiĝas al limo, transportojn de vunditoj, havas precizan priskribon de temperamento kaj karaktero de malamikaj generaloj, li detale konas animon kaj disciplinon de divizioj, brigadoj kaj regimentoj de malamiko, ĉar li estas palpinta per siaj palpiloj, bone pagataj spionoj, la tutan landon de la kontraŭulo de kortego en monarka restadejo ĝis la lasta malgrava garnizono — per unu vorto li estas matematike preparita kaj sur margeno de sia plano li trovas respondon al ĉiuj eventualoj. Nenia improvizio, nenia poeziado — ĉio estas scienco, cifero kaj linio.

Rigardsorĉanta aperaĵo por soldatoj li absotute ne estas. Male. Li havas nenion soldatan. Li portas perukon, estas razita kaj aspektas kiel maljuna virino, sur ĉevalo li sidas mallerte kaj tre malbone rajdas li ne scias paroli kaj ne sole li ne konas soldatojn kas ne interesas pri ili, sed post mallonga paŭzo li eĉ ne rekonas oficirojn, kun kiuj li dum jaroj estis laboranta en kancelario — jen, la armeestro oe la nova epoko. Kaj li ne estas escepto: en rus-japana milito li havas sian sekvantono marŝalon Oyama. Dika vireto kiel barelo, celpunkto de ŝercoj de ĉiuj japanaj satirbildetoj, soldato, kiu direktas batalon malproksime de batalejo per telegrafo kaj telefono, kiu ne scias rajdi, ne interesas pri armeo kaj spite tio venkas.

La soldateco fariĝis scienco. La buĉistoj de la homaro estas matematikistoj kaj konstruistoj. Oni jam ne improvizas.

Kaj la poezio de heroeco malsupreniris je kelkaj ŝtupoj. Al subarmeestroj, komandantoj de divizioj, regimentoj kaj batalionoj.

Skobelev en rus-turka milito, Devet ĉe Boeroj, Kondratenko en fortikaĵo de Port-Artur, — tiuj fascinas soldatojn, sed ankaŭ iras kun ili en unu linio sur buĉejon. Kaj tia rigardsorĉanta komandanto en linio: estis Benedek. Lia sorto montras, ke la militisteco havas jam tute novan formon, tre diferencon de la formo estinta. Li, improvizanto kaj poeto de soldateco el malnova skolo, estis lokita kontraŭ scienculo kaj matematikisto Moltke. Li malgajnis kompreneble ĉion. Sed ne per sia propra kulpo. Cetere, en lia sorto estas soldata tragedio, al kiu similan ne havis la tuta dekaŭa jarcento. Eble sole Kuropatkin lin iom memorigas, sed fine en la fatalo de Kuropatkin mankas la kvina akto, kiu sola faras tragedion.

## II.

Lia vivo memorigas flugon de raketo; ie el mallumo ĝi ekflugas, levigas siblante kaj triumfe supren, okuloj de miloj kaj miloj observas kun admiro ĝian vojon kaj gloron, ĝi siblas kaj supreniras, kvazaŭ ĝi militiro: ĝis je haro ekzakte li scias, en kiom da horoj post la

proklama, li povas ĵeti sur landlimon tiom kaj tiom da soldatoj. Li konas volus alteni sin ie en ĉielo kaj fariĝi nova stelo — subite en alteco okazas la katastrofo, la raketo krakas, disŝprucas kaj estingiĝinte falas malĝoje al la tero.

Li devenis el protestanta nobela familio hungara. Li naskiĝis en 1804 en Szopron, kie lia patro estis kuracisto. En la urbo hazarde estis diviziestro Radetzky, postea marŝalo. Radetzky malsaniĝis, doktoro Benedek resaniĝis lin kaj la dankema generalo promesis sian helpon al kuracisto, se li iam ĝin bezonos. Kaj la doktoro profitis tion. Lia filo Ludoviko montris inklinton por soldatservo. Nenio mirinda — ĵus estis post Napoleon'aj militoj, kaj la homaro apenaŭ spiris pro admiro pri kariero de la francaj marŝaloj, pri maso da bataloj, kies pulvon oni povis ankoraŭ flari en aero, pri heroaj agoj de individuoj kaj la tuta kapturniga kadenco de la historio, en kiu la milito ludis la ĉefan kaj solan rolon. Radetzky helpis kaj la dekkvarjara knabo, kvankam protestanto, estis akceptita en soldatan akademion en Wiener Neustadt. En sia dekoka jaro li komencis aktivan servon kiel leŭtenanto ĉe infanteria regimento en Capua en Italujo.

La nomada soldata vivo estas praktika lernejo de la oficiro. Per pilgrimado el unu garnizono en alian li lernas lingvon de la popolo, inter kiu li devas vivi, en novaj regimentoj li konatigas al si specialaĵojn de nacioj, el kiuj ili rekrutiĝas, li studas regionojn kaj tutajn landojn dum ekzercoj kaj manovroj, li venas en kontakton kun homoj de ĉiu ebla kulturgrado — kaj kiu sole unufoje interparolis kun tia pli aĝa soldato, al kiu la naturo donis malfermitajn okulojn kaj orelojn, certe jesos al mi, ke tia soldata nomado tra la monarnio estas la plej bona lernejo de la vivo, lernejo, kiun povas envii al li ĉiu civilulo. El Capua Benedek estis translokita en Graz, poste en Verona'n, en Milano'n, el tie en Lwów'on, kie li fariĝis adjutanto de la komandanta generalo, maljuna, parolema kaj oportuna sinjoro, kies li estis ne sole la dekstra mano, sed ankaŭ la kapo. Kaj tie li konatiĝis kun juna, sprita, klera, filigrana vidvino Julia von Woyna, li enamiĝis kaj edziĝis.

Tiu edziĝo alportis al li solan kaj daŭreman feliĉon en la vivo, eĉ, por lia rememoro ankaŭ grandan feliĉon postmortan, ĉio cetera estis fumo kaj efemero.

Kaj nun ekflugis alten la raketo de lia sorto.

En la jaro 1846 ekkomencis ribelo de pola nobelaro kaj kontraŭribelo de vilaĝanoj kontraŭ nobelaro.

Aŭstrio, kiel ĉiam, perdis la kapon. La landestro estis senkonsila, la generaloj ne sciis, kion komenci.



Tiam la subkolonelo Benedek ekpostulis de la komandanta generalo plenpovon por subpremo de la malpacoj. La generalo donis ĝin. Benedek rajdis tra Galicio, atingis la urbon Bochnia, revenigis malgrandan garnizonon, kiun li tie trovis preta por forkuri kaj direktis sin kontraŭ ribelantoj. La batalo ne estis longa. — Benedek havis sole unu vunditon kaj en okcidenta Galicio ekregis trankvilo.

Tio estis la venko apud Gdow; la nomo de tiu urbo revenis en vivon de Benedek ankoraŭ unufoje.

La arĥiduko Ferdinand, tiama galicia landestro kaj komandanta generalo, trovis, ke Benedek estas meritinta ordenon de Maria Theresia, plej altan revon kaj lastan deziron de ĉiuj aŭstriaĵoj soldatoj. Benedek petis do tiun ordenon, kiel estas ordonite per statutoj. Sed Aŭstrio de Metternich ne volis konfesi al Eŭropo, ke en Galicio estis malpacoj, kaj eĉ tiom gravaj malpacoj, ke iu povus akiri en ili ordenon de Maria Theresia. Tial la kortega militkonsilantaro aljuĝis al Benedek komandoran krucon de Leopold, sed eĉ tiu ŝajnis al kanceliero Metternich tro kriaanta distingo, do li malaltigis ĝin al kavalira kruco de la sama ordeno.

Kaj tiam okazis io eksterordinara en Aŭstrio. Benedek, kiam la ordeno alvenis, ĝin rifuzis. La generalo, kiu devis ĝin al li alpingli, tute konsternite sciigis ĉi tiun agon en Vieno. Kaj en Vieno — tio estis la antaŭmarta Aŭstrio — oni ne vidis alian helpon ol trankviligi iel la ofenditan subkolonelon. Skribis al li la kanceliero de la ordeno, skribis al li la prezidanto de „Kriegsrat“ (militista konsilantaro) kaj longe daŭris, ĝis Benedek trankviliĝis. Taksojn li pagis, sed ne volis akcepti diplomon. Ree oni skribis kaj skribis, fine ili kontentigis lin: ili aldonis promocion al kolonelo kaj translokis lin en Italujon.

Tie Benedek ree estis sub komando de sia malnova favoranto marŝalo Radetzky. Li venis ĝustatempe. En Milano komencis revolucio, la aŭstria armeo retiriĝis. Benedek kun sia regimento ŝirmis ĝian maldekstran flankon. Marŝante li aŭdis, ke tri italaj regimentoj de la aŭstria armeo ekribelis kaj transiris al revolucionuloj — tuj li sentis avidecon deflankiĝi en Kremona'n kaj fari tie ordon, sed hazarde aliĝis al lia regimento la garnizono el Piacenza, kies komandanto estis kolonelo pli aĝa ol Benedek, kaj Benedek devis meti sin sub lian ordonon, marŝi antaŭen kaj lasi Kremona'n. Li ŝatmis kaj bolis pro furiozo kaj malbeno kaj sendis al maljuna marŝalo raporton, kie li esprimis sin pri sia tempa ĉefo per vortoj ne tro serĉataj. Kaj la maljuna sinjoro havis evidente la saman opinion: pro direktado de la majstra retiriĝo li havigis por Benedek komandoran krucon de Leopold.

Benedek estis tiam en Mantova. La Sardegna reĝo Karlo Alberto marŝis post Austrianoj. Unu nokton la arda kolonelo ekkuris kun areto da soldatoj kaj atakis la malamikan armeon. Li ne iris malproksimen, la gvardioj ĝustatempe ekpafis, sed la Italoj havis sufiĉe da timo.

Kiam la maljuna marŝalo subite sin turnis ofensive kontraŭ malamikon, Benedek estis en sia elemento. Apud rivereto Curtatone li sovaĝis kiel leono: li konkveris malamikajn remparojn, mortigis la Toskananojn, malliberigis masojn da soldatoj — ĉiam kaj ĉie en fronto de sia brigado, ekscitita, entuziasmita, ĝojigita per laboro. La sekvantan tagon apud Goito li ree estis en sia elemento — la maljuna Radetzky sendis al li krucon de Maria Theresia. Fine li posedis ĝin, tamen laŭ konsilo de homoj konantaj la Vienan atmosferon li ne devis porti ĝin pli frue, ĝis la aprobo el Vieno estos veninta.

En la batalo apud Custozza li ne estis. Li devis reveni en Mantovan, kie li koleris pro enuo. Post tiu batalo li malĝoje skribas al Julia: „Kiel oni sin batis en lastaj tagoj, Vi eble estas leginta en gazetoj. Mi bedaŭrinde ne ĉeestis. Malbenata Mantova!“ Fine li ricevis ordonon ekmarŝi kontraŭ Milanon. Sed al metio jam ne estis okazo: Radetzky eniris en Milanon kaj sekvis armistico.

Benedek ĉagreniĝis.

Dume en Vieno estis revolucio. Benedek'on ĝi ne impresis, por li Vien'anoj estis „malsaĝuloj“ kaj „simiuloj“ de Parizanoj.

Hungario bolis ankaŭ. Kamarado de Benedek, la kolonelo Meszaros, estis nomita en konsento kun Vieno ministro de militistaj aferoj en Hungario kaj proponis al li komandecan de la landa milico kun generala grado. Benedek ne sciis, kion fari. El Vieno oni oficiale komunikis al li — Vieno ludis tiam kun Magiaroj duŝencan ludon — ke li povas akcepti tiun postenon kaj ke estus dezirinde, ke li ĝin akceptu. Sed samtempe sekrete oni konigis al li, ke plej bone estus, se li ne akceptus. Benedek do malakceptis. La malfeliĉulo Meszaros, kiu poste hazarde troviĝis en revolucio ne sciante kiamaniere, mortis post jaroj kiel ekzilulo en Anglujo — sorto, kiu certege estus renkontinta ankaŭ Benedek'on, kaj se ne tiu, ankoraŭ ia pli malbona.

En la jaro 1849 rekomencis laboro en Italujo. En batalo apud Mortara, en divizio de arĥiduko Albrecht li ree laboris kun vervo kaj entuziasmo — poste vespere li penetris en urbon Mortara kaj vidante, ke li troviĝis en centro de malamika armeo multe pli nombra, ne perdis prudenton kaj minacordonis al ĝi — formeti armilojn. Kaj la surprizitaj Italoj obeis. Nun Benedek estis adorita heroo de soldatoj kaj teruro de

malamikoj. Benedek ĉi qui! (Benedek estas ĉi tie!) estis por Italoj signalo por forkuri.

Du tagojn post tio estis la batalo apud Novarra, batalo, kiu estis epilogo de la tuta militiro kaj kostis tronon al Karlo Alberto. Benedek skribas pri ĝi, ke „lia feliĉo similas al fabelo.“ Li havas dekok vunditajn oficirojn en sia regimento, du kugloj traflugis lian mantelon, kartoĉa pafaĵo forŝiris pecon de lia pantalone. Se li ne havus ordenon de Maria Theresia, nun li devus ĝin ricevi.

Arhiduko Albrecht donis al li sabron, kiun estis havinta lia patro, arhiduko Karlo, en batalo apud Aspern kaj petis ŝanĝe la sabron de Benedek. Ambaŭ viroj ligis sin tiam per amikeco.

Kun generala grado foriris Benedek de sur itala batalejo. Krom la maljuna marŝalo Aŭstrio ne havis soldaton pli popularan super li.

### III.

En Italujo estis trankvilo, sed en Hungario estis malbone. Windischgrätz, kiu sin montris tiom eminente bona kontraŭ amaseto da studentoj en revolucio de Praha, neniel taŭgis en Hungario. Tute male: per sia malcerto kaj eterna prokrastado li lasis al Magiaroj tempon por centrigado de fortoj kaj disvastigado de revolucia movado en larĝaj klasoj populaj. Generalo Görgey subite troviĝis per lerta manovro en dorso de la aŭstria armeo kaj fortranĉis ĝin de Cislajtano. Vieno forvokis la nobelan marŝalon de sur batalejo kaj anstataŭis lin per generalo Welden. Görgey liberigis sieĝitan Komaron kaj la imperiestra armeo retiriĝis al Vaho.

Kaj ĉi tien estis sendita Benedek kiel brigadkomandanto. La aŭstria armeo atendis rusan helpon, ĉar Vieno akceptis dankeme proponon de la caro Nikolao kaj Paskieviĉ almarŝadis. Benedek estis senpacienca — ne estis okupo. Dume la armeo reorganiziĝis: el malnovaj brigadoj oni formis novajn kaj la komandanto Welden estis anstataŭita per Haynaŭ, „hieno de Brescia“, kaj postea „sangmakulita hundo de Arad“. Al Benedek estis ordonite, ke li per sia nova brigado konservu komunikigon kun la rusa dekstra flanko. Haynaŭ, la nova komandanto, proponis al li postenon de estro de ĉefa stabo, sed Benedek rifuzis. Tiam li sciis, ke li estas sur sia posteno nur en fronto de batalantaj soldatoj.

Li vere estis. En bataloj apud Raab kaj Komarom li distingis sin tiom, ke li estis nomita de la imperiestro posedanto de la 28<sup>a</sup> regimento de Praha, honorigo, kiun ĝis tiam atingis neniu tiel juna generalo elirinta el nekonata protestanta familio. Li estis feliĉa.

Apud Szöreg „la Bayard de la aŭstria armeo“ estis vundita sur femuro per peco da eksplodinta grenado. „Mi havas do ĉion, kion konvena soldato havi devas,“ li skribas kun humoro al sia edzino. Kelkajn semajnojn li estis ligita al lito — dame la hungaria revolucio finiĝis sub rusaj kaj aŭstriaĵ armiloj.

Du jarojn pli malfrue, mallonge antaŭ sia morto, la maljuna Haynaŭ sendis al Benedek oran poŝhorloĝon kun engravurita dediĉo por memoro. Ĉi tiu terura homo estis cetere tipo de soldato de malnova epoko: senkompata, kruela, perforta ĝis miro — kaj subite ree mola kaj senmalica kiel infano; en sia ofico li konis sole unu aferon: obeon, per kiu li sciis ĉion senkondiĉe plenumi kaj kiun li ankaŭ senkondiĉe postulis de aliaj — la maljuna Radetzky, delikata konanto de karakteroj, lin karakterizis per bela simbolo: li estas razilo, kiu post uzado estas prudente kaŝota . . . . Kompreneble oni ne devis fari el ĉi tiu viro plej altan juĝiston super la kapitulaciintaj revolucionuloj en Arad . . . .

Sekvis jardeko de paco. Benedek estis nomita estro de ĉefa stabo ĉe sia malnova favoranto Radetzky en Italujo. Li iris do, sed post promeso de la imperiestro, ke „se la rilatoj ŝanĝiĝos,“ li tuj estost ransokita en armean servadon. La maljuna marŝalo sincere amis Benedek'on. Eĉ pli malfrue, en sia testamento li rekomendis lin al imperiestra favoro. Kaj eĉ sekvanta afero ne difektis ilian amikan rilaton: en la jaro 1852 Benedek ricevis el Vieno de la generala adjutanto imperiestra, la grafo Grünne, striktan ordonon, ke li citu generalon Theodoron Radetzky, filon de la marŝalo, al peto pri pensionigo. Benedek obeis kaŝ la maljuna marŝalo, kiu nur poste eksciis pri tio, estis morteme ofendita kaj volis ankaŭ iri en pension, kaj nur per la propramana letero de imperiestro li estis kvietigita, sed Benedek'on li pro tio ne malamamis, ĉar li konis Vienon kaj ĝian dankemon, li englutis do la maldolĉan pilolon kiel ĉiujn antaŭajn, kiujn li estis ricevinta dum sia longa vivo, kaj sciis, ke Benedek sole plenumis kun soldata obeo la donitan ordonon.

En la sama jaro Benedek estis plirangita al submarŝalo — ree eksterorde.

En jaro 1854 minacis milito kun Prusujo. Benedek, tiu soldato laŭ korpore kaj animo, estis neniel entuziasmita per ĝia perspektivo. Kiam la tintado de armiloj eksilentis kaj la prusa militista adjutanto, la princo Hohenlohe, lin vizitis en Verona, li diris al li bonkore: „Neniam mi imagis, ke ni havos militon kun Prusoj: tio estus plej terura tago de mia vivo, ĉar mi konsiderus tion kiel plej grandan malfeliĉon de Aŭstrio . . . .“

La tagon, kiam Radetzky post 72 jaroj de aktiva servo foriris el

armeo, Benedek estis nomita komandanta generalo en Lwów. Kaj post la Nova jaro 1859 li estis subite alvokita Vienon, kie oni komunikis al li, ke li estas nomita komandanta generalo de la oka armea korpuso kaj ke li tuj devas forveturi en Verona'n.

La milito kun Piemonto kaj Francujo komencis. Grafo Gyulai estis nomita supera komandanto aŭstria, ĉar li montris sin kiel taŭga — komandanto de kavalerio en manovroj. Kiel estro de lia stabo estis nomita kolonelo Kuhn, bona strategiisto kaj soldato tiom energia, kiom Gyulai estis malrapidema kaj sendecida. En grafo Gyulai kaŭzis la burĝa Kuhn preskaŭ nervan eksciton jam per sia ĉeesto kaj la senrespektema Kuhn neniel kaŝis mokojn pri la komandanta kapableco de sia generalo. Kuhn do konsiladis kaj proponadis kaj Gyulai faris la malon. Kuhn volis detrui la piemontan armeon antaŭ alveno de Francoj, Gyulai decidis atendi, ĝis Francoj estos alvenintaj. Por ke ŝajnu, ke io okazas, Gyulai ekmarŝis al Torino — kaj subite donis ordonon al retiriĝo.

„Enuanta milito!“ plendis Benedek.

Post bataleto apud Montebelo Gyulai donis ordonon al plua retiriĝo. Kuhn furiozis kaj petis sian eksigon. Nur post speciala peto de la imperiestro li restis. Benedek enuegis sin ĝis al malespero. La kvaran de junio li ricevis ordonon rapidegi sur batalejon. Estis la batalo apud Magenta. Li ne alvenis ĝustatempe. Stranga batalo! En centro kaj en maldekstra flanko ĝi estis nedecidita, en dekstra flanko estis venkita Clam-Gallas, grafo kaj unu el plej nekapablaj generaloj aŭstriaĵ. La sekvantan tagon Kuhn volis daŭrigi batalon kun freŝaj fortoj de la korpuso de Benedek, sed Clam-Gallas anoncis, ke lia soldataro ne estas kapabla batali. Post tio Gyulai donis je meznokto ordonon retiriĝi.

Benedek ne havis alian deziron ol „ke la tempo havu flugilojn, por ke li jam povu ĉi tiun servon forlasi kaj iri . . .“

Gyulai estis eksigita kaj la imperiestro Francisko Jozefo mem prenis sur sin komandantecon de la armeo.

La 24<sup>an</sup> de junio okazis apud Solferino la lasta batalo de ĉi tiu milito. Tio estis la plej glora tago de la vivo de Benedek. Ĝis la antaŭa tago li havis febron kaj kuŝis en lito — je meznokto subite li revenis sana al armeo. Li estis komandanto de la dekstra flanko de la armeo, havis kontraŭ si duoblan malamikan superforton, ĵetis sin kontraŭ ĝin en fronto de sia soldataro kun sabro en mano, elektrizis al agoj de soldataj mirakloj, kaj kiam la centro kaj la maldekstra flanko estis venkitaj kaj la imperiestro donis ordonon retiriĝi, li ne obeis, denove sin ĵetis sur Piemontanojn kaj donis al ili ankoraŭ „unu“.

Li ricevis komandoran krucon de Maria Terezia, kiun petis anstataŭ li

generalo Schlick kaj la oficiroj de lia korpuso, ĉar la fierega soldato mem ne volis peti.

La imperiestro kontraktis pacon. Lombardio estis perdita. Benedek estis avansita al submarŝalo, nomita estro de ĉefa stabo kaj provincestro en Hungario. Post gravaj malvenkoj komencis en Vieno ia klariĝo, ke nobelaj sinjoroj, princoj kaj grafoj ne estas ĝuste naskitaj armeestroj kaj landestroj, oni do kumulis sur unu solan homon, kiu estis savinta honoron de aŭstria armiloj, ĉion, kion oni sur lin kumuli povis. Benedek konis sian kapablon kaj rifuzadis — li eĉ la estante sata de ĉio, kaj kvazaŭ li sciis, ke lia feliĉo staras en zenito, kaj ke de nun povas veni sole la sunsubiro, volis iri en pension kaj vivi kun sia edzino en trankvilo, kiom ankoraŭ vivi restis, sed la imperiestro malakceptis lian peton kaj donis al li ordonon servi plue. Kaj Benedek obeis.

En Hungario Benedek ne povis montri sin kiel taŭga. Li estis sole fascinanta komandanto en batalejo kaj ne diplomato, kiu sciis delikate flegi vundojn apenaŭ cikatriĝintajn. Pulvo kaj plombo ne estas ĝuste bonaj kvietigantaj rimedoj, kaj Benedek ne konis aliajn. Tiel li parolis kaj tiel li agis. En Vieno oni ekkonis la eraran paŝon kaj Benedek estis baldaŭ nomita supera komandanto de la armeo en Italujo.

La soldataro bonvenigis lian enoficigon kun entuziasmo, ĉar oni sentis, ke ne estas ankoraŭ paco kun Italujo, sed sole tempa armistico, kaj la populareco de la nova komandanto estis sola ebla kontraŭpezo de la populareco de Garibaldi kaj de Viktoro Emanuelo.

Heredanto de la gloro de Radetzky, espero kaj fiero de aŭstria armeo, li staris nun sur loko, kie la maljuna marŝalo iam estis rikoltanta sangajn laŭrojn. Taŭga viro sur bona posteno! La juna itala reĝolando estis preparita elŝiri la lastan provincon, kiu apartenis al ĝi laŭ lingvo, nacio kaj sito, el ungegoj de la nigra aglo — Benedek staris tie kiel neuzita glavo.

Soldato laŭ animo, koro kaj eksterajo. Nealta, kun malhela vizaĝkoloro, agla nazo, akra kaj penetrema rigardo de nigraj okuloj, vaksitaj lipharoj kun pinto supren tordita. Sur ĉevalo li sidis, kvazaŭ li estus alkreskinta, severa kaj senkompatema dum ekzercado, precipa kontraŭ oficiroj, dum interparolado post ekzerco ĉe glaso da vine afabla, malavara, kamaradema. Al simpla soldato li sciis ekparoli en lio gepatra lingvo, sen fieraĉo kaj sinaltigado per kerna blasfemo kun ŝerca iom kruda, sed ne ofendanta, kun neŝajnigita demando pri familiaj rilatoj de la soldateto. Ili amis lin kaj konfidis al li.

## IV.

En marto 1866 oni vokis Benedek'on en Vienon, al gravaj militist-aj konferencoj. Milito en nordo kaj sudo de la monarĥio pendis en aero. Kaj tie la generalo eksciis por sia plej granda mirego, ke li estas elektita komandanto de la armeo norda, ke li devas batali kontraŭ Prusoj. „La plej terura tago de lia vivo“ proksimiĝadis, kaj al li estis konfidota tia rolo en okazontaĵoj!

Li malakceptis ĝin. Li klarigis al la imperiestro, ke li ne posedas sufiĉajn strategiajn konojn, ke li neniam tro okupiĝis pri milita teorio, ke li ne scias konduki kvaron-milionan armeon da homoj, kaj, kio koncernas la nordan batalejon, ke li ne konas Bohemujojn, eĉ ne scias, kie Elbo fluas. En la malvastaj italaj rilatoj li ĉion memfidus: tie li konas ĉiun arbon, ĉiun ŝtonon, kaj promesas al la imperiestro sukcesan defendon de la Venezia lando. En nordo li garantias nenion.

La situacio de la imperiestro estis grava. Liaj konsilantoj kaj aliancanoj el la regno volis havi Benedek'on komandanto en nordo ĉiukondiĉe li estis la plej populara aŭstria generalo, havis konfidon de soldatoj kaj oficiroj — ne nomi lin signifis en okazo de malvenko amason da pravigitaj riproĉoj kaj eble ankoraŭ pli malbonajn aferojn. La dua eminenta aŭstria soldato, marŝalo arhiduko Albrecht, estis populara nek en la armeo nek inter la loĝantaro, nek ĉe la germanaj aliancanoj. Li havis ja malĝojan reputacion el la revolucio en Vieno 1848 kaj el kruda provincestrado en Hungario en j. 1860 . . . Nomi imperiestran princon kiel komandanton de la armeo povis esti fatala en okazo de la malvenko por la tuta dinastio, dum la komandeco de Benedek faros bonan impreson eĉ en Hungario — li estas ja naskiĝe Hungariano . . .

Dufoje traktis la arhiduko Albrecht kun Benedek, dufoje rifuzis la generalo ankaŭ al li, kiel antaŭ tio al la imperiestro, decide kaj klare, kaj pretigis sin reveni en Veronan. Sed en nokto antaŭ sia forveturo li estis vekita kaj petita de la imperiestra adjutanto grafo Creneville pri lasta interparolo. La adjutanto komunikis al generalo sciigon de la imperiestra sinjoro; ke la monarĥo prenis sur sin gravan respondecon, se kontraŭ voĉo de la publika opinio li nomus alian generalon komandanto. Se tiu estus venkita, la imperiestro estus kulpa de tiu malfeliĉo kaj restus al li nenio alia ol abdiki la tronon. Ke sekve en mano de Benedek estas la sorto de la imperiestro.

„Mi estus estinta senkaraktera homaĉo, se eĉ post similaj klarigoj mi estus rifuzinta“, rakontis pli malfrue Benedek en unu intima momento.

Li diris al la imperiestro, ke li estas preta oferi al li sian burĝan kaj soldatan honorojn kaj akceptis komandecan de la norda armeo.

La imperiestro proponis al li marŝalan ordonbastonon — Benedek ne akceptis dirante, ke li devas ĝin meriti sur batalejo, se li estas ricevonta ĝin.

Rompite li forlasis Vienon. Sen konfido al siaj fortoj li staris antaŭ sia tasko, en animo plenan da nigraj antaŭsentoj kaj el malproksimo li aŭdis tondri veturilon de la Fatalo, kiun li por ĉia prezo volis eviti, kaj pri kiu li nun certege sciis, ke li estos per ĝi frakasita.

Pli malfrue, jam post la katastrofo, kiam Benedek vivis en Graz maldolĉan vivon de malbenata kaj mokata homo, li ordigis unufoje siajn paperojn kaj trovis leteron de Albrecht, per kiu la marŝalo lin estis invitinta al interparolo. Estis jena interparolo en marto, kiu koncernis komandecan en Bohemujo . . . „Kaj mi azeno iris tien, tio estis komenco de mia malfeliĉo“, li tiam alskribis sur tiun leteron.

Ankoraŭ unu rimedon li ekprenis en sia malbona situacio: li postulis, ke oni donu al li kiel komandanton de ĉefa stabo la eminentan teoriiston kaj strategiiston John, kiu estis servanta sub li ĝis tiam en Italujo. Sed ĝuste tiun ili ne donis al li dirante, ke estas necese, ke li restu en Italujo ĉe la arhiduko Albrecht kaj anstataŭ tiu oni sendis al li konsilanton de Albrecht Krismaniĉ'on kaj aldonis Henikstein'on. Krismaniĉ sciis meti en bonegan stilon siajn raportojn kaj planojn — liaj konajtoj estis bazitaj sur militiroj de Fridrich II., la taktiko kaj strategio de napoleonaj mititoj ankoraŭ ne ekzistis por li; Henikstein estis homo tre sprita, kiu sciis ekvidi malfortecojn de homo granda kaj malgranda kaj moki pri ili. Jam el pasintaj jaroj li estis amiko de Benedek kaj estis tial sendita sur batalejojn, por ke li anstataŭu-lin, se ia malfeliĉo okazus al la kuraĝega komandanto. Ĉar en bona memoro konserviĝis la kuraĝaj atakoj de Benedek kun sabro en mano kaj en fronto de la pasiĝita soldataro . . .

Sed la submarŝalo jam ne estis tiu heroo el ardantaj tagoj sub itala ĉielo. Li estis jam aĝa de sesdekdu jaroj, la sango jam ne cirkulis tiom rapide en liaj vejnoj kaj sur batalejojn, kien oni lin sendis, li iris rompote kaj pereigite kiel reznaciinta bruto en buĉejon.

Antaŭ ol la milito komencis, li ankoraŭ iris en Verona'n. Ĉi tie li lasis al si de junega subkapitano Hold klarigi la geografion de Germanujo . . .

En majo li foriris al sia armeo en Olomouc. Li inspektis soldatojn, penis akiri ilian konfidon, provis inspiri al ili esperon per armeaj ordonoj - - - dume li skribis al sia edzino: „Se mi revenos ĉe Vi kiel vipita



armeestro, havu kompaton por mi kaj lasu min porti mian malfeliĉon silente, kiel decas por viro“.

La deknatan de junio Benedek donis ordonon de marŝo en Bohemujon. La Prusoj rapidegis en tri armeoj trans limojn kaj Moltke fiksita a 29<sup>an</sup> junion kiel tagon de ilia kuniĝo. Kiel fajrero el estingiĝinta fajro eksaltis espero en Benedek; la maljuna soldata praktikulo vidis, ke eble oni do povos akiri sukceson, ke eble oni povos detruigi la dividitan malamikon parton post parto kaj donis ordonon por marŝi kontraŭ armeon de Fridrich Karl, kiu staris apud Jizera.

„Mi esperas, ke mi tamen venkos ilin“ diris Benedek al sia stabo. Li flaris pulvon, kaj la eĥo de liaj junaj jaroj evidente aŭdigis en lia animo . . .

Sed Krismaniĉ opiniis, ke ĉefa principo de la milito estas havi siajn fortojn kune, ke do estas necese atendi en Josefov, ĝis estos almarŝintaj ankoraŭ la ceteraj aŭstriaĵaj taĉmentegoj — kaj Benedek, kiu havis pian respekton por ĉio, kio nur odoris doktrine, cedis.

Jen estis la plej granda eraro de la tuta militiro. Nesufiĉaj korpusoj, lokumitaj kontraŭ prusaj armeoj en Bohemujon penetrantaj, sub komando de nekapablaj kaj neobeemaj estroj, estis venkataj en ĉiuj flankoj. La Saksoj kaj la malfeliĉega Clam-Gallas — post batalo apud Magenta oni donis al li komandantecon en Bohemujo — estis venkitaj de princo Fridrich Karl, Ramming'on venkis Steinmetz kaj la arĥiduko Leopold, kiu komencis batalon spite la klara malpermeso de komandanto, perdis apud rivero Úpa en kelkaj horoj 5000 da homoj. Clam-Gallas estis tuj vokita Vienon kaj al arĥiduko Leopold oni donis subitan forpermeson „pro malsano“. Kiel estro de ĉefa stabo estis nomita Baumgartner.

Kaj la kompatinda supera komandanto vidis, ke li estas venkita ne estinte en batalo. Li donis ordonon retiriĝi al Králové Hradec (Koeniggraetz).

La imperiestro sendis sian intimulon, la subkolonelon Beck, al armeo. Kaj post konsiliĝo kun li Benedek telegrafis al imperiestro petante, ke li kontraktu pacon por ĉia prezo, ke la katastrofo estas neevitebla.

Venis respondo: „Pacon kontrakti neeble. Se retiriĝo estas necesa, oni retiriĝu. Ĉu oni jam bataladis?“

Ĉi tiun demandon Benedek rigardis kiel indirektan ordonon. Li ne retiriĝis. Li komencis batalon. Matene li skribis al sia edzino: „Vi, mia imperiestro kaj Aŭstrio estos miaj pensoj. Mi estas kvietita ka preta; kiam kanonoj ektondros, mi spiros libere“.

La batalo komencis. Elbo en dorso kaj Prusoj en duonrondo ĉirkaŭe — sed ankoraŭ unufoje ekridetis la trompema Feliĉo la maljunan sol-

daton: dum la tuta antaŭtagmezo aŭstriaĵoj ŝancoj estis bonaj. Prusoj kun sopiro atendis alvenon de ilia kronprinco . . . La princo almarŝis sur batalejon je la dua horo. La katastrofo estis jam ĉi tie.

Aŭstria infanterio forkuradis. Artilerio kaj kavalerio ŝirmis ĝian retiriĝon. Kaj Benedek la lastan fojon tondris sur batalejo de pozicio en pozicion tra pluvo da kugloj kaj grenadoj, ordonante, malbenante, petante . . .

Vespere je la 10<sup>a</sup> horo li telegrafis al la imperiestro el Holic, ke la antaŭvidita kaj anoncita katastrofo okazis kaj ke la venkita armeo retiriĝas al Olomouc.

Kaj la 11<sup>an</sup> de julio oni komunikis al li, ke arĥiduko Albrecht prenis sur sin komandecon de armeo . . .

Arĥiduko Albrecht, venkinto apud Custoza. Kun helpo de John li venkis Italojn, la imperiestro cedis Venezian provincon al Napoleon III., kiu ĝin donis al Italujo kaj la triumfanta armeo revenadis el sudo al malgaja nordo. Arĥiduko Albrecht donis ordonon, ke la venkita armeo retiriĝu al Vieno.

Kaj de la grafo Creneville, imperiestra adjutanto, Benedek ricevis sciigon, ke li devas prezenti sin en Wiener Neustadt al ekspertiza komisiono kaj pravigi sin el malfeliĉaj faroj kaj nesufiĉa servmaniero per unu voĉo: prezenti sin antaŭ militista juĝistaro.

## V.

Antaŭ ol Benedek akceptis komandecon de la norda armeo, li kondiĉis, ke al neniu, krom la imperiestro, li estos respondeca pro direktado de la milito, kia ajn estu ĝia rezultato. Tion oni al li certe promesis. Sed jen, li estis vokata antaŭ esploran komisionon, kiu stilformis serion da demandoj koncernantaj la tutan direktadon de la milito kaj precipe la batalon apud Králové Hradec. Tiujn demandojn en speciala cirkulero estis dissendinta arĥiduko Albrecht ankaŭ al ĉiuj subkomandantoj de Benedek por kritiki. La vivega edzino de submarŝalo furiozis kaj volis, „ke lia edzo parolu, ke li ĉion diru, ke li montru dokumentojn.“ Sed la maljuna soldato fidis al la imperiestra promeso kaj kredis, ke lia soldata honoro estos al li konservita, okazu kio ajn. Obeeme li iris antaŭ esploran komisionon konsistantan el kelkaj treege maljunaj kaj tute sensignifaj generaloj, kunmetinte brakojn sur brusto staris antaŭ ili, respondis per frazoj kiel eble plej mallongaj, sole al demandoj plej necesaj kaj prenis sur sin respondecon pri la tuta militiro. Sur sin sole. Ĉar ankaŭ Henikstein, Krismaniĉ kaj Clam-Gallas staris antaŭ la sama komisiono.

Clam-Gallas, grafo kaj edzo de unu el unuaj belulinoj en monarĥa restadejo, kiu devenis el familio de Dietrichstein, estis trovita de la

komisiono kiel tute senkulpa, propramana letero de la imperiestro dankis lin pro fidela servado kaj la generalo revenis al aktiva servado en eminentan oficon.

Henikstein, Krismaniĉ kaj Benedek estis trovitaj kulpaj, la militista juĝa senato pravigis la decidon, restis nur eldiri kondamnon — sed tio ne okazis; laŭ la imperiestra ordono „la plua procedo estis ĉesigita“.

Ankaŭ la arĥiduko Leopold resaniĝis kaj sen iu malhelpo reprenis komandecon super sia estinta armea korpuso.

Benedek foriris en Pensionopolon de aŭstriaĵ soldatoj, en Graz. En seka stilo oni sciigis al li, ke li estas eksigita en pension. Kvardekkvar jarojn li estis servinta. Li foriris tien kun la tuta pezo de sia malfeliĉo, sed nerompite, lia soldata honoro estis ja en zorgemaj manoj kaj li kredis, ke venos tago, kiam ĉio estos klara. Unu afero doloris lin: ke la imperiestro lin ankoraŭ ne alvokis por postuli de li klarigon de pasintaj malbonaj aferoj. Ĉar li estis responda sole al li.

Malordoj de multaj jardekoj, malseriozeco, malzorgeco, putriĝinta sistemo kaj ĉiufanka kulpoplana administrado kaŭzis rezulton de tiu milito — li portis respondecon pro fremdaj kulpoj kaj estas nature, ke li deziris sin liberigi de ĝi. Kiel en malliberejo li atendis en Graz la vorton, kiu estis elkondukonta lin foren. Dume flugadis al lia orelo aliaj vortoj. Moltke, granda silentanto kaj lia triumfanta kontraŭulo, ekparolis. Oni demandis lin pri Benedek, kaj tiu seka matematikisto de mortigado diris: „Venkita armeestro! Se laiko havus nur iom da ideo, kio kaŝas sin sub tiuj vortoj! Vespere post la batalo apud Králové Hradec en aŭstria ĉefkvartalo! Se oni tion imagas! Kaj tiom meritplena, kuraĝa kaj prudenta generalo kiel Benedek!“

Fine okazis io.

La 19<sup>an</sup> de novembro alveturis subite en Graz'on arĥiduko Albrecht. Kortuŝa estis la renkonto de ambaŭ malnovaj amikoj, du armeestroj, la feliĉa kaj la malfeliĉa el du militiroj de ĉi tiu jaro. Kaj la feliĉa postulis ankoraŭ unu oferon. Ke Benedek silentu pri ĉio, kio okazis inter li kaj la monarĥo antaŭ la milito, ke li ne diru eĉ vorton el tio, kio estis traktata inter ili, ambaŭ armeestroj, ke li neniam donu ian klarigon, pravigon, malkaŝon nek skribe nek buŝe — kaj Benedek promesis silenti ne sole per sia honora sed ankaŭ subskribita vorto kaj per dokumento datumita en la sama tago, kiu poste estis almetita al sekretaj skribaĵoj pri milito en 1866. La arĥiduko forveturis kaj ambaŭ amikoj estas vidintaj sin la lastan fojon en sia vivo.

Kiam mortis la generalo John, estro de ĉefa stabo el batalo apud Custoza 1866, arĥiduko Albrecht elpetis la tutan korespondon kaj

ĉiujn skribajn registrojn de la mortinto, kaj tiel okazis, ke la familio ne ricevis eĉ la privatajn leterojn. La marŝalo, kiu skrupule zorgis, ke lia bildo en historio estu plej brilanta, evidente timis, ke iam povus aperi diversaj cirkonstancoj kaj ke li minimume devus partigi la gloron de la triumfo kun iu alia. Similan pentradon li preferis prudente malebligi, dum tempo estis.

Certe tre diferencaj pensoj de ĉi tiu kondukis lin en Graz. La malfeliĉa Benedek povis partigi nur sian malfeliĉon, nur la respondecon — nenion alian.

Kaj tiu lia malfeliĉo devis ankoraŭ poste atingi plej altan gradon. La lasta frapo estis ankoraŭ venonta.

Benedek do bruligis post la 19<sup>a</sup> de novembro ĉiujn notojn pri la milito 1866. Kaj ankaŭ certan dokumenton, kiu povis esti ŝildo de lia soldata honoro.

Subite la okan de decembro de la sama jaro la gazeto „Wiener Zeitung“ publikis tre longan artikolon, kie el aŭtoritata partio kaj antaŭ la tuta mondo Benedek estis montrita kiel kulpano de malfeliĉa rezultato de la tuta militiro. Henikstein kaj Krismaniĉ faris ĉion, kion ili povis, sed la ĉefa komandanto meritas punon pro ĉio, kio okazis. „Perdo de konfido“ de lia plej alta imperiestra sinjoro, detruo de lia soldata reputacio ĉe samtempuloj kaj en estonteco, ekkono de la senfina malfeliĉo, kiu sub lia komando trafis armeon kaj la tutan monarĥion, devas cetere por viro tiel honorema kaj fiera, kiel Benedek ĉiam aperis, esti puno pli grava ol tiu, kiu lin povus trafi en plua juĝeja procedo“. En simila tono la tuta artikolo daŭriĝas.

Kaj post ĉi tiu ekfrapo komencis ĵurnaloj de la tuta monarĥio. Satiro kaj humoro per vorto kaj bildo subtenis la aferon. Benedek en momento fariĝis unu el la plej malsaĝaj, mokindaj kaj malseriozaj figuroj de la tuta monarĥio. Al strata amaso, kiu post la milito en Vieno kriis al imperiestra kaleŝego: Abdanken! (Abdiki!) oni devis ĵeti viktimon. Kaj ju pli glora ĝi estis, des pli efika ĝi devis esti. La amaso ĵetis sin sur ĝin, disŝiradis ĝin, kriegadis pro plezuro posedi ĝin kaj ĉesis pensi pluen. Ĝi estis kontenta.

„Perdo de konfido de lia plej alta imperiestra sinjoro“, jen kio estis la ĉefa. Tiu frapo trafis. „Mi enterigis la reston de miaj soldataj iluzioj kaj de mia soldata poezio en ĉi tiu jaro“, li skribas post iu tempo al princo Thurn-Taxis, kiu volis lin viziti. Benedek petas lin ne veni al li. Kiaj povis esti la tagoj, kiaj la noktoj de ĉi tiu estinte fiera soldato! De ĉi tiu servisto de sia sinjoro, unu el plej fidelaj, kiujn ĝenerale la historio konas.

Venis ĉe li la historiisto Vivenot kaj petis de li kelkajn raportojn el malfeliĉa milito, per kiuj li povus sin pravigi — Benedek rifuzis. La edzino insistis, keli parolu, sed sen sukceso. „Tio utilus nek al la imperiestro, nek al armeo. La venkita armeestro devas porti sian malfeliĉon.“

Neniam tiu viro estis pli granda ol en ĉi tiu sufero.

Sole siajn amikojn Albrecht kaj John li ne povis pardoni. Ili ambaŭ estis iniciantoj kaj redaktintoj de la artikolo en Wiener Zeitung el la 8<sup>a</sup> decembro. John lasis sin ekskuzi ĉe li, skribis, ke li ne partoprenis en la artikolo, li alveturis en Graz'on kaj petis insistege interparoladon, sed la ĉagrenita soldato ne enlasis lin kaj vidi lin ne volis.

Kaj ne sole li mem silentis, eĉ al la aliaj li ordonis silenti. Lia intima amiko Müller, lia adjutanto el jaro 1866, ĉeestis, kiam Benedek bruligadis siajn paperojn. Müller konis ilin kaj sciis pri ĉio — post morto de Benedek li diradis, ke li devis konservi almenaŭ unu dokumenton. Ĉar Benedek bruligis eĉ tion, kio estis skribita per la propra mano de lia plej alta soldata estro. Tiu Müller ankaŭ post morto de Benedek redonis al marŝalo Albrecht la sabron de arĥiduko Karlo. Kiam la marŝalo volis ĝin lasi al li memore, li modeste rifuzis kun vortoj, „ke tiu sabro jam neniam povas esti portata de soldato pli brava ol Benedek estis.“ Kaj tiu Müller ankau silentis kiel tombo — cetere la arĥiduko Albrecht alvokis lin al sia servo kaj gardis lin serion da jaroj.

Post iu tempo revenis en la animon de Benedek ia malvarma kvieto. Li eliradis promeni, rekomencis legi ĵurnalojn, iradis ĉasi, iafoje haltigis iun konatan oficiron kaj komencis interparolon kun li.

Oni eĉ atingis ian alproksimiĝon kun la arĥiduko Albrecht. Arĥiduko nome faris de tempo al tempo paŝon. La servisto de Benedek ŝtelis al sia mastro soldatajn ordenojn kaj malaperis. Albrecht aŭdinte pri tio sendis al li la siajn. Benedek dankis strikte soldate. Poste arĥiduko verkis broŝureton „Pri respondeco en milito“, esprimis sin tie laŭde pri Benedek kaj sendigis ĝin al li. Benedek ree dankis. En jaro 1872 post fino de imperiestraj manovroj en Galicio venis arĥiduko en urbon Gdow, ekmemoris tie pri la unua heroa ago de Benedek kaj skribis al li koran leteron. Sed en fino li almetis: „Mi malpermesas al Vi respondi . . .“ Tial Benedek ne respondis. Gdow — ĝi estis loko, kie Benedek kiel juna subkolonelo en jaro 1846 subpremis la revolucion en okcidenta Galicio kun areto da soldatoj.

Estas evidente, ke la trankvilo de silentanta soldato estis nur glacia ŝelo por ekstera mondo — interne verŝajne estis alie . . .

En jaro 1873 venis la imperiestrido Rudolf, tiam dekkvinjara, en Graz. Li estis en akompano de sia instruisto la generalo Latour kaj

devis viziti Benedek'on — laŭ ordono de sia imperiestra patro. Eble tio estis la unua paŝo al iu favora komunikigo, eble — kiu scias? . . . Benedek ne estis hejme, kaj la princo skribis al li tre afablan leteron. Kiam la maljuna soldato ĝin ricevis, li diris malgaje: „Estas malfrue!“ Poste lia malnova fiero vekigis kaj li ekdiris: „Tio estas malmulte!“ Li ne anoncis sin al aŭdienco, sed skribis al generalo Latour, petante, ke li esprimu „lian dankon.“ Latour postulis, ke li danku direkte la princon. Tio ankaŭ estis plenumita. Kaj en nova letero al Latour li skribas: „Fine mi estas interne finita, mi ne volas esti ĝenata en mia trankvilo.“

Sole unu aferon li atendis: ke la imperiestro lin alvokos al si kaj ke komencos la grava interparolo, per kiu sole estos finitaj la kontoj de pasinteco — sed tio ne okazis.

Li mortis pro kola kancero la 27<sup>an</sup> de aprilo 1881. Laŭ sia deziro li estis enterigita en simpla burĝa vestaĵo, li, soldato laŭ korpo kaj animo. Lia testamento montras, ke li forlasis mondon ne repaciĝinte kun sia estinta amiko marŝalo Albrecht.

Lia edzino Julia, kunsuferantino en lia silentado, zorgis, ke almenaŭ la memoro de ŝia edzo restu senmakula. Ŝi donis ĉiujn restintajn paperojn al aŭstria historiisto H. Friedjung, kiu eldonis ilin en dika volumo kun detala komentario kiel „Restintaj paperoj de Benedek.“

La generalo nome havis en sia edzino ankaŭ sian plej fidelan amikon. Al ŝi li skribis el ĉiuj militiroj, antaŭ batalo, post batalo, li skribis al ŝi pri ĉio, kio okazis, kion li pensis, sentis, kaj esprimoj de amo alternas kun efektivaj soldatoj bultenoj — kaj tiel almenaŭ parte estis eble, ke la edzino povis paroli, kie edzo silentis. Tuta vivo estas en tiuj leteroj: komence grandioza, ĝojeganta, feliĉa kaj poste muta tragedio de fidela servisto de sia ĉefo. La ŝtata argumento kaj la muĝado de la stratamaso bezonis viktimon — la leteroj montras, kia tiu viktimo estis kiel homo. Kaj samtempe, kia estis la ŝtata argumento.

## ESPERANTA EPIZODO.

*Originale verkis Jan Havran.*

Jan Ran venis el malgranda bohema urbo en Berlinon dum libertempa vojaĝo. Kiam li estis la trian tagon en Berlin, li vizitis kunvenon de esperantista klubo en Köpenickerstrasse. Jan Ran estis juna. Li venis Berlinon por vidi tiun grandegan urbon, en kiu montriĝas plej evidente germana kulturo. Dum Ran iradis tra la stratoj, veturadis en omnibusoj, elektraj tramvojoj, autobusoj kaj subtera fervojo, li palpis per ĉiuj

sentiloj de sia korpo kaj animo tiun enkorpiĝintan germanan kulturon. Jan Ran estis juna. Li estis Ĉeĥo, Slavo, kaj li ne amis la german kulturon, kvankam estis edukita per ĝi. Estas jam tiel: la lernistoj ne amas la instristojn. Pedagogio malmulte sukcesis koncerne tiun flankon. Li havis en la plej profunda kojno de sia koro esperon, ke la okcidenta kulturo disfalos, bankrotos, kaj ke sur ilian lokon venos ia nova kulturo slava, ke kulturo de intelekto estos anstataŭita per kulturo de koro. Sed li mem estis intelektualisto, kiu pensis kaj eĉ sentis racionalisme certe pli profunde ol Ostwald aŭ Haeckel. Plej ofte oni tion, kion oni ne havas, plej multe deziras, estimas, adoras, kaj pro tio la plej bonaj membroj de homaro estas malkontentaj, ĉar des pli klera iu, des pli multajn aferojn nehavatajn li konas.

Do sinjoro Ran vizitis kunvenon de esperantista klubo. Li ne iris tien volonte, ĉar li ofte vizitadis kunvenojn esperantistajn kaj tre malbone amuzadis en ili per ilia senutila konversacio kaj malsaĝa entuziasmo. Sed li iris tien tamen pro scivolemo, por koni germanajn adeptojn de esperanto.

La ekstero de la restoracio, en kiu estis la kunvenejo, ne estis tro aloga. Iaj „festaj saloj“ en kiuj dimanĉe estadas popola dancado. Jan Ran venis tre frue, preskaŭ unu horon antaŭ oficiala komenco de la kunveno. Veninte en kunvenejon, li trovis sole unu gaston, fraŭlinon, kiu ŝajnis bela. Ran ekĝojis, ĉar li tre amis babiladi kun belaj virinoj, kaj ĉar li dum la 3 tagoj tre malmulte parolis. Li aliĝis al la tablo kaj ankoraŭ pli multe ekĝojis. La fraŭlino esti vere bela kaj juna, dudek tri a dudek kvarjara. Tio prave eĉ mirigis lin, ĉar en esperantistaj kunvenoj li renkontadis multajn virinojn, sed tre malofte belajn virinojn. Belaj virinoj ne ŝajnas havi intereson en propagando de internaciaj ideoj; estas kompreneble, ĉar amo konsumas tutan ilian animan vivon.

Ran prezentis sin al la fraŭlino, diris sian nomon, profesion kaj patrujon, kaj ĉar ankaŭ ridmaniero de la fraŭlino plaĉis al li, li diris al si, ke li amuzos la fraŭlinon tiel bele kaj saĝege, ke si neniam forgesu lin, interesplenan fremdulon, ke ŝi komprenu, ke estas diferenco inter animo slava kaj germana. Kaj li komencis paroli.

Li sciis paroli. Li estis fascinanta rakontanto pri fremdaj eĉ propraj pensoj. Precipe virinoj amis aŭdi liajn paradoksojn kaj sentimentalajn ironiojn. Ankaŭ la berlina fraŭlino auskultis: laŭdon de la residencurbo, mokojn pri esperantistoj, kritikojn pri aktualaj movadoj, ideoj, ŝercojn pri amo, pri la vira seksa pasiveco kaj virina aktiveco. La fraŭlino mi skultis, ridis, ridetis.

Dune kunvenadis la kunveno. Kiel Ran eksciis, estis la kunveno pro-

pre unua lekcio de esperanta kurso aranĝata de la klubo, en kiun estis en jurnalaj invititaj „ĉiuj, kiuj volas ellerni simplan kaj praktikan lingvon internacian esperanton“. Kunvenis proksimume 50 personoj. Preskaŭ neniu el ili sciis paroli esperante, sed ĉiu sciis, ke esperanto estas „bona afero“ kaj tre volonte salutadis unu la alian „bonan vesperon“.

La fraŭlino ekmalatentis la parolojn de Ran. Tre ofte ŝi foriradis for sia seĝo, bonvenadis la venantojn, klarigadis esperantan gramatikon al lernantoj. Ĉe Ran sidis malbela virino, maljuna virgulino, kiu fanfarone proklamis, ke en esperanto substantivoj finas per o. Baldaŭ la bela fraŭlino, sola bela virino en la tuta ĉeestantaro estis okupita per gramatikaj lekcioj komplete.

Jan Ran komencis enui. Li komencis observi ĉeestantaron. La sama vidaĵo kiel en la tuta mondo de li konita. Tre meza klaso, ofte submeza klaso socia kaj kultura, kiu volas doni al si ŝajnon de pli supera klaso.

Ĉambro sen komforto, biero kaj teo solaj trinkaĵoj, netaŭgaj vestaĵoj, malsaĝaj vizaĝoj, tro malgranda modesteco.

Kulturaj homoj estas modestaj en societo.

Proksime de Ran sidis junuleto en uniformo de rusa studento, preskaŭ dudekjara kaj kun malgajaj okuloj rigardis lin kaj kun maldolĉa voĉo rakontis ion al sia najbaro. Jan Ran ekparolis lin kaj eksciis, ke li estas rusa studento, hodiaŭ veninta Berlinon kaj veturanta Barcelonon por viziti sian katalonan amikino konatan el esperanta korespondado. Li ne konis eĉ unu vorton germane. Kaj kun akcepto de germanaj samideanoj estis tre malkontenta. Neniu akceptis lin, kaj kiam li alvenis en kunvenon, neniu parolis kun li. Juneco ĉiam ion postulas kaj neniam estas kontenta. Sed ankaŭ Ran ne estis kontenta, kvankam li estis pli aĝa je dek jaroj ol la Ruso. Do ili decidis foriri el la kunveno. La prezidanto de la grupo diris al ili kelkajn vortojn, Ran faris kelkajn ĉercojn pri la grandurbo, kaj malvarme adiaŭis la berlinan belulino. Ŝi distrita pro atento de la instruado distre kaj malvarme dankis, kaj la ambraŭ slavoj foriris.

Ili veturis en Fridrichstrasse, kie kuregis nokta vivo de Berlino. Miloj da elektraj lampetoj pikis en okulojn, miloj da elegantaj virinoj ebruiĝis intelektojn.

„Ĉe ni, en Kievo“ diris la rusa junulo, „la polico ne permesus tian promenadon en la nokto“. Kaj baldaŭ ili disiris. La Ruso iris en sian hotelon „Russicher Hof“, kie neniu persono parolis ruse kontraŭ certega aserto de aŭŝo, Ran iris en kabaredon „Unter den Linden“.

Kaj tie-ĉi sidante, auskultante rakonti diversajn konatajn anekdotojn, kaj trinkante bonan vinon Jan Ran fariĝis tre malĝoja kaj rememorante



la fraŭlinon el esperantista kunveno, li ne povis klarigi al si sian malsukceson. Jes, li vere malsukcesis, li ne interesis la fraŭlinon pli multe ol la amaso de esperantista lernantaro. Kial?, kial? kuŝis kiel ŝtoneto en lia cerbo. Li longe pensis pri tio kaj fine li diris en malĝojo: „Jen la kaŭzo de mia malsukceso: mia maljuniĝas“. Kaj li estis tre malĝoja pro tio, kaj estis bezone trinki la tutan botelon da vino por forpeli la malĝojan humoron.

Nur poste li trovis alian klarigon: „La germanino estis pli malsaĝa ol mi“.

Oni diras, ke en la vino estas vero. Estas do poveble, ke la diveno de Ran estis ĵusta. Sed certe oni tion ne povas diri, ĉar la vino tro ofte mensogas. Kaj ĝenerale oni povas dubi pri ĉiu vero.

## RAKONTO PRI HOMO KUN ORA CERBO.

El „Lettres de mon moulin“ de *Alphonse Daudet* tradukis *Raoul Viennois*.

Al sinjorino, kiu postulas gajajn rakontojn.

Legante Vian leteron, sinjorino, mi eksentis kvazaŭ memriproĉon. Mi ekkoleris pro koloro iom tro duonfunebra de miaj rakontoj, kaj mi ekintencis dediĉi al Vi hodiaŭ ion gajan, freneze gajan.

Kial mi estus malgaja fine? Mi troviĝas milon da mejloj for de la Paris'aj nebulaĵoj, sur luma monteto, en regiono de la tamburetoj kaj de muskata vino. Ĉirkaŭ mi ĉio estas sole suno kaj muziko; mi havas orkestrojn de skolopoj, orfeonojn de paruoj; matene, la kurlojn\*), kiuj krias „kurli! kurli!“; en tagmezo cikadojn, poste la paŝtistojn, kiuj fajfas sur ŝalmo kaj belajn brunajn knabinojn, kiujn oni aŭdas ridi sur vinberkampoj. Laŭ vero, la loko ne taŭgas por malgaji; mi devus preferi sendi al sinjorinoj rozkolorajn poeziaĵojn kaj plenajn korbojn da ĝentilaj rakontoj.

Nu, ne! Mi estas ankoraŭ tro proksime de Paris. Ĉiutage, ĝis inter miajn pinojn, ĝi sendas al mi radkoton de siaj malgajoj. . . . En la sama momento, kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, mi sciĝas pri la mizera morto de la kompatinda Charles Barbara; kaj mia muelejo estas pro tio tuta en funebro. Adiaŭ kurloj kaj cikadoj! Mia koro sentas jam nenion gajan. . . . Tial do, sinjorino, anstataŭ la beleta ŝercema rakonto, kiun mi estis promesinta skribi por Vi, Vi ricevos hodiaŭ ree nur melankolian rakonton.

Vivis unufoje homo, kiu havis oran cerbon; jes, sinjorino, cerbon tutan el oro. Kiam li ekdivis lumon de la mondo, la kuracistoĵ opiniis:

ke tiu infano ne vivos, tiom lia kapo estis peza kaj lia kranio supermezura. Li tamen vivis kaj kreskis sub la suno kiel bela oliva plantaĵo; sole lia granda kapo fortiradis lin konstante, ke tio estis kompatiga vidi lin ekpuŝantan dum marŝado ĉiun meblon. Li ofte faladis. Unu tagon, li deruligis sur ŝtuparo kaj ekfrapis per frunto kontraŭ marmora ŝtupo, kie lia kranio eksonoris kiel fandaĵo. Oni pensis, ke li estas morta; sed relevante lin, oni trovis sole sendanĝeran vundon kun du aŭ tri sekiĝintaj gutetoj da oro inter liaj blondaj haroj. Tiamaniere la gepatroj eksciis, ke la infano havas cerbon el oro.

Oni sekretigis la aferon; la malfeliĉa infaneto mem suspektis nenion. Intertempe li demandis, kial oni jam ne lasas lin kuradi antaŭ la pordo kun knabetoj el strato.

Oni vin ŝtelus, mia bela trezoro, respondis al li lia patrino.

Tiam la infaneto timegis, ke oni lin ŝtelos; li revenis ludi tute sola sen ion diri, kaj trenis sin peze el unu ĉambro en alian.

Fine en lia dekoka jaro, la gepatroj malkovris al li la monstran donacon, kiun li havis de la sorto; kaj ĉar ili estis edukantaj kaj nutrantaj lin ĝis tiam, ili postulis de li redone iom da lia oro. La infano ne ŝanceliĝis; tuj — kiel? tion la rakonto ne diras — li elŝiris el sia kranio pecon da pura oro, pecon grandan kiel nukso, kiun li fiere jetis sur genuojn de sia patrino. Poste, tute miregigita de riĉaĵo, kiun li portis en sia kapo, freneza pro deziroj, ebria per sia povo, li forlasis la gepatran hejmon kaj ekiris en mondon malŝparante sian trezoron.

Laŭ maniero, kiel li aranĝis sian vivon, reĝe kaj semante oron ne kalkulante, oni estus dirinta, ke lia cerbo estas neelĉerpebla. Ĝi tamen elĉerpiĝis kaj iom post iom oni povis vidi, kiel liaj okuloj estingiĝas, la vango kaviĝas. Fine, unu tagon, matene post freneza diboĉo, la malfeliĉulo, restinte sola inter restaĵoj de la festeno kaj lustroj, kiuj paliĝadis, ektimegis pro la terura truo, kiun li jam estis farinta en sia trezoro; estis tempo ĉesi.

De tiam komencis nova vivomaniero. La homo kun ora cerbo iris por vivi en soleco, per laboro de siaj manoj, suspektema kaj timema kiel avarulo, evitante la tentojn, penante li mem forgesi tiun fatalon riĉecon, kiun li jam ne volis tuŝi. Malfeliĉe, unu amiko estis sekvanta lin en lian solecon, kaj tiu konis lian sekreton.

Unu nokton, la malfeliĉa homo estis subite vekita per ia doloro en kapo, terura doloro; li leviĝis kofuzite kaj vidis en luna radio sian amikon, kiu forkuradis kaŝante ion sub sia mantelo.

Ree oni ŝtelis al li pecon da lia cerbo!

Post iu tempo la homo kun ora cerbo enamiĝis kaj ĉi tiun fojon ĉio

estis finita. Li amis el fundo de sia animo blondan virineton, kiu lin certe ankaŭ amis, sed kiu pli ankoraŭ preferis pomponojn, blankajn plumojn kaj beletajn ruĝbrunajn kvastojn, kiuj balancas sur boteto.

Inter la manoj de ĉi tiu aminda kreitaĵo — duone birdo, duone pupo — la oraj moneretoj malaperadis, ke tio estis ĝojo. Ŝi havis ĉiujn kapricojn; kaj li neniam estus kapabla diri ne: li eĉ, timante ŝin ĉagreni kaŝis antaŭ ŝi ĝis la fino la malgajan sekreton de sia riĉero.

„Ni estas ja tre riĉaj“, diradis ŝi.

La kompatinda homo respondadis:

„Ah! jes . . . tre riĉaj!“

Kaj li ridetis kun amo al blua birdeto, kiu naive manĝadis lian kranion. Iafoje tamen kaptis lin timo, li ekvolis esti avara; sed tiam la virineto venadis al li saltetante kaj diradis:

„Edzo mia, ĉar vi estas tiom riĉa! aĉetu al mi ion tre koston . . .“

Kaj li aĉetadis al ŝi ion tre koston.

Tio daŭris tiel dum du jaroj; poste, unu matenon, la edzineto mortis, kaj neniu sciis kial, simile al birdo. La trezoro iris al fino; kun tio, kio restis el ĝi, la vidvo lasis aranĝi al sia kara mortintino belan enterigon. Sonorado per ĉiuj sonoriloj, pezaj karosoj vualitaj per nigra drapo, ĉevaloj kun plumfaskoj, arĝentaj larmoj en veluro, nenio ŝajnis al li tro bela. Ĉu valoris nune ion lia oro? Li donis ĝin por preĝejo, al portistoj, al vendistinoj de helikrizoj; li disdonis ĝin ĉien sen marĉandi. Kompreneble, kiam li foriradis el tombejo, preskaŭ nenio estis restanta al li el tiu mirinda cerbo, apenaŭ kelkaj partetoj sur parioj de la kranio.

Tiam oni vidis lin iranta tra la stratoj, kun frenezula mieno, kun pendantaj manoj, faletanta kiel ebria homo. Vespere, en momento kiam la vendejoj lumiĝas, li haltis antaŭ larĝa montra fenestro, kie brilis sub lumo miksaĵo de ŝtofoj kaj ornamaĵoj kaj restis tie longe rigardante du botetojn el blua atlaso borderitajn per cigna lanugo. „Mi konas iun, al kiu ĉi tiuj botetoj farus plezuron“, diris li kun rideto kaj ne memorigante jam, ke lia edzineto estas mortinta, li eniris por aĉeti ilin.

En malantaŭo de sia vendejo la vendistino aŭdis ekkriegon; ŝi alkuris kaj regresis vidante starantan viron, kiu apogis sin sur vendotablo kaj rigardis ŝin dolore kun idiota mieno. En unu mano li tenis blujajn botetojn kun cigna lanugo kaj montris la duan manon tute sangumitan kun deskrapaĵoj de oro sub ungoj.

Tia estas, sinjorino, la rakonto pri homo kun ora cerbo.

Malgraŭ sia aspekto de fantazia legendo ĉi tiu rakonto estas vera de la komenco ĝis la fino. Estas en la mondo kompatindaj homoj, kiuj estas kondamnitaj vivi el sia cerbo kaj pagas la plej etajn aferojn de la

vivo per bona delikata oro, per ilia nedolo kaj substanco. Tio estas por ili ĉiutaga doloro; kaj poste, kiam ili estas lacaĵ pro suferado . . .

## POPOLO ESPERANTISTA.

*Malgajaĵoj pensoj de dr. Stan Kamaryt.*

Unu de lastaj flugfolioj idistaj mokus pri memkonscio de la popolo esperantista. Ĉu ekzistas tia popolo? Bedaŭrinde, ĝi ekzistas, kaj ne sole la popolo, sed eĉ la nacio esperantista ekzistas, nacio malsaĝega, karaj samideanoj. Sed ne ploru pro tio, fratoj malproksime starantaj unu de la alia, tio estas afero natura, kaj kion naturo donacis, estas, kaj homoj sole malrapide povas tion ŝanĝi. Kaj estas historia fakto, ke ĉiu granda ideo havas siajn parazitojn. Havas ilin Libera penso, pacifismo, abstinentismo, ekspresionismo, havas alin esperantismo. La plej malsaĝaj homoj tre ofte estas ankaŭ la plej profitamaj, amante tro senproportie la bonfarton kaj povon, kaj la plej gloramaj. Tial ili are aliĝas al novaj movadoj esperante per ili veni ien supren, kie staros potoj da viando kaj pano. Tiu fakto estas ĉe esperantisma movado tre rimarkebla kaj kompreneble ĝi ne estas agrabla.

Jen kelkaj pruvoj, kiuj dokumentas tion, kion dirite.

La malsaĝaj profitemulaj estas timemaj. Tial ili volas esti regataj, ĉar regata simplulo, kiu kredas je kapablo de sia reganto, estas ĉiam ekster danĝero pensi kaj agi. Jen kial naskiĝis nacio esperantista, havanta ĉiuj malbonecojn de malbona nacio. Ĉar laŭvere ekzistas ankaŭ malbonaj nacioj, plej ofte tiuj, kiuj naskiĝas aŭ malnaskiĝas, kaj similas al infanoj aŭ al maljunuloj, ekz. nacio de magiaroj, kiel ĝin reprezentas magiara nobelularo. Nacio esperantista bezonis antaŭ ĉio iun reganton, reganton absolutan, kiun neenviindan pastenon ĝi donacis al nia bedaŭrinda „Majstro“ Zamenhof. Kaj ĉar nacionala amaso estas senkompata, la genia proponinto de esperanto dum sep kongresoj devis ludi harlekenan rolon do „majstro“ de naivaj simpluloj, kiuj kriegis vidante lin kaj kiuj sencele kaj senfine balbutante en esperanto asertadis sin reciproke, ke esperanto estas tre bona afero, kaj ke ili estas fidelaj al la „Majstro“. Kaj la majstro bezonis ministrojn. Do la sankta spirito de la nacio eniris tuj en cerbojn kaj korojn de sesdek eminentuloj, kiuj proklamis sin kiel la plej alta aŭtoritato de la movado. Kaj la nacio esperantista kriegis pro ĝojo, ĉar ĝi havis la bezonan registaron. La registaroj, eĉ se ili konsistas el tre saĝaj homoj, ne ĉiam estas saĝaj. Mi ne konas ĉiujn sesdek unuajn membrojn de la Lingva komitato, sed ĉiuj,

kiujn mi konas, neniel superas la ordinaran kulturalan nivelon, tre ofte ili estas sub ĝi, ekz. sinjoro Ed. Kühnl. Miaj amikoj, al kiuj ne kredi mi ne havas argumenton, diras la samon pri aliaj membroj de mi nekonataj. Kaj se oni legas la diversajn cirkulerojn de L. K. kaj artikolojn kaj paroladojn de ĝiaj membroj, oni volonte kredas, ke kultura ŝtupo de ili ne estas alta. Sed tion nacio esperantista bezonis. La simplulo ne komprenas vortojn de moderna komplikita kultura homo. Sed ĝis nun la nivelo de la L. K. ne plialtiĝis, kvankam, aŭ ĵus pro tio, nombro de membroj duobliĝis. Ŝajnas eĉ, ke sento de devo inter ĝiaj membroj malgrandiĝis, Centra oficejo ekz. devas petegi ilin, ke ili almenaŭ legu „Oficialan gazeton“ kaj respondu cirkulerojn de la prezidanto. Sed nacio esperantista estas kontenta kun sia registaro. Ĉiu nacio havas tielan registaron, kielan ĝi meritas; sed neniam povas malbona registaro pereigi la vivopovan nacion. Habeat sibi, amata esperantistaro.

Ke inter esperantistaro, almenaŭ inter tiu, kiu aktive partoprenas en esperantista movado, la nekleraj elementoj estas en plimulto, plej evidente pruvas sorto de diversaj esper. gazetoj. Certe la plej brilajn sukcesojn havis la gazeto „Spritulo“, tiu kolektanto de la plej malnovaj kaj plej malsaĝaj spritaĵoj. Tiun ĉi gazeton oni plej ofte aŭdis laŭdi. Ho samideanoj, kian guston vi havas! Kaj „Voĉo de kuracistoj“, unu de la plej seriozaj, ĉesis eliradi pro manko da abonantoj. Kaj dume ĝi eliradis nek vorteto de instigo, nek vorteto de laŭdeto, kiu kuraĝigus la multimemam eldonanton, laŭtiĝis. Ankaŭ la „Duonmonata“, tre vigle redaktata, post unu jaro ĉesis eliradi, pro manko da abonantoj. De verketo „Slovakoj kaj Magiaroj“ estis vendita unu milo, ĉiuj ceteraj restis. Dume oni aĉetas teruran sensecaĵon „Scherlock Holmes en servo de hispana reĝo“, per kiu s. Kühnl volas reprezenti boheman literaturon, kaj „Kelkaj floroj esperanta.“, per kiuj prezentas sin holanda humoro.

La naciesperantaj gazetoj estas en sia plimulto simile mizeraj. Ili raportas pri propagandaj aferoj malĝuste, ili scie mensogas, kaj volas, ke movado ĉe ilia nacio ŝajnu al fremduloj plej vigla, kaj dum tio naive kredas, ke alinaciaj gazetoj raportas pri sia movado laŭ vero retrograndigante. La tradukoj el naciaj lingvoj montras evidentan celon pacifistan: nealigi sian nacion super la aliajn. Tial oni kun kortuŝa unuanimeco elektas por traduko la plej malbonajn verkaĵojn el ĉiuj literaturoj.

La mizerulo tre amas entuziasmon, trezoro de malriĉuloj estas iluzio. Jen kial la esperantistaro estas entuziasmula. Oni estas ebria per entuziasmo, se kunvenas en „regiona kongreso“ tridek balbutistoj, kaj, la izolitaj samideanoj ne regretas monon por salutaj telegramoj, kaj la ĉeestantoj malŝparas po unu spesmilo por komuna tagmanĝo, dum kiu

ĉiu ĉeestanto trifoje toastas, kaj el kiu oni sendas al Zamenhof ilustritan poŝtkarton kun flama devizo kaj tridek nelegeblaj subskriboj. Kien aminda doktoro Zamenhof donas sian kolekton de poŝtkartoj? Ĝi tre taŭgus por ornami ian necesan ejon, sed mi estas certa, ke li konservas ilin zorgege. Do laŭ tiu flanko la entuziasmo esperantista trafas sian celon. Sed ĝi efektivas ankaŭ aliajn ĝojaĵojn. La promenanta publiko ordinare estas „atentigata“ pri nia sankto afero per nacia standardo, kaj la kelneroj estas gajigataj per naiva nescio de restoraciaj kutimoj, kiun montras la plimulto de la ĉeestantaro. Malbelaj naivaj fraŭlinoj neniam mankas. Mi ĉiam regretis tiujn senkulpajn oferojn de esperantista entuziasmo, kiuj venis en movadon nesciante kial kaj kiel kaj nun estas trenataj el unu kunveno en alian, el unu kongreso en alian, kaj tamen enuas ĉe tio tiel same, kiel dum tuta sia vivo. Ankaŭ propaganda parolado neniam mankas. La parolanto pruvas bezonon de la lingvo internacia kaj ĉiam tion pruvas tiel klare, ke la ĉeestantaro brue aplaudas kaj neniu kontraŭstraras, ĉar ĉiuj estas esperantistoj. La neesperantista publiko neniam venas en tiujn kunvenojn, kaj estas bone, ke ĝi ne venas, ĉar ĝi certe ne akirus bonan impreson pri nia movado. Akademio ankaŭ neniam mankas. Naivaj diletantoj kantas kaj deklamas diversajn esperantajn, kelkafoje eĉ naciajn, verkaĵojn, aŭ ludas naivajn komediojn. Kaj poste oni iras hejmen. Kaj kongresoj „naciaj“ diferencas de la regione sole per tio, ke ili havas 40 anstataŭ 30 partoprenantojn.

Sed restas nia „plej brila propagandilo“, kongresoj internaciaj. Per ili miaj karaj sambatalantoj tre volonte fanfaronas. Ili estas bruegaj. Ĉar ankaŭ sovaĝulo, se li ĝojas, kriegas. Nenio plu okazas en ili. Oni kriegas kaj bruas, se Zamenhof eniras estradon, oni kriegas se sro Chavet legas iajn raportojn, oni kriegas dum ekskursoj kaj dum la maska balo, kaj finfine oni disiras en hejmon kaj legas poste pri diversaj aproboj aŭ malaprobaj de la kongreso. Sed oni entuziasmis bonege. Oni estis en entuziasmo pro ne konata kaŭzo, oni nenion faris por propagando aŭ organizacio de nia laboro, kaj tamen oni estas feliĉa pro sukceso. Ĉu estas ie pli entuziasmaj homoj ol estas ni? Kaj pripensu, ke multaj kongresanoj ŝparis la tutan jaron por povi viziti la kongreson, kaj malkontentigitaj unufoje, ili reveninte hejmen ekŝparas denove kaj vizitas la kongreson sekvantan. Mi konis homon tridekjaran, kiu unuan fojon veturis en pagita droŝko al malferma „festo“ de nacia kongreso. Kaj pri unu de niaj junaj kondukantoj oni rakontas, ke en Boulogne sur Mère li vivis dek tagojn per 50 frankoj, pagante ĉiujn enirpagojn kaj partoprenante ĉe ĉiuj festenmanĝoj, kie oni toastis, kaj nutrante sin per pano kaj akvo. Ĉu povas esti pli granda oferemo ol oferemo de niaj samideanoj, de esperantistaj patriotoj? De oferemo

